

N-ro 4

Oktobero


1912

★ ESPERANTISTA ★
GAZETO
DANLANDO ★

Sub redakcio
de
ANDR. NISSEN



**Eldonejo Esperantista
KOPENHAGO**






Serio
de
Konataj Danaj Esperantistoj



Cand. jur. *Frédéric Baruël.*
(Kopenhago.)
Membro de Lingva Komitato.
Estrarmembro de
„Societo
de Danaj Esperantistoj“.



Fino *Margrethe Noll.*
(Kopenhago.)
Estrarmembro
de l'Administra Komitato.
Sekretario de
„Esperanto Unuiĝo de Danaj
Instruistoj“.



Ĉu Napoleon mortis sur St. Helena?

Ekzistas ĝis ĉi tiu tago multaj francoj, kiuj neas la malliberecon de Napoleon sur St. Helena kiel kompreneble ja ankaŭ lian morton sur tiu insulo. Ilia neskuebla konvinko — kaj tio estas interesa fakto — estas bazita sur sennombraj atestoj de la 19. jarcento.

Estinta policoficisto, kies nomo estas *Ledrun*, rakontas en siaj memorskriboj, ke oni en Marto 1808 komisiis lin trovi viron, kiu tute, sen diferenco, devus simili la grandan imperiestron. Ledrun rapide trovis tiun homon, kiun li serĉis, per helpo de leŭtenanto ĉe la 3. infanteriregimento, *Rochalve*, kiu montris al li soldaton, kies simileco je Napoleon estis konata ĉie en la regimento. Lia nomo estis *François Eugène Robeaud*, kaj li estis naskita la 19. de Julio 1781 en Baleicourt. Fouché, kiu dum multaj jaroj estis la konfidenciulo de Napoleon, prezentis lin ĉe la imperiestro, kiu lin „aprobis“. — „Ĝis la jaro 1816 mi nenion aŭdis pri la soldato; poste komencis la estraro en Baleicourt esploron pro lia malapero, sed oni ne eksciis ion pri lia sorto, kaj oni baldaŭ prokrastis la tutan aferon . . . Tiuj ĉi okazintaĵoj ĉiam ŝajnis iom mistikaj al mi“, skribis Ledrun en siaj memorskriboj.

Kompreneble estus naiveco, se oni el de tiuj ĉi priskribitaj okazintaĵoj, kies fideindecon oni ja ne povas kontroli, volus fari konkludojn, sed kiel iom da certigo de la nomitaj supozajoj oni povas citi, ke kaj *Hudson Lowe* (la angla guberniestro sur St. Helena) kaj *Las Case* skribas en siaj memorskriboj, ke generalo *Bertrand* kaj la kuracisto en Longwood *O'Méara* interrilatis tre familiare kun la malliberulo de la rokinsulo, dum tiu siaflanke montris al ili mirindan respekton, kiel ankaŭ ke la fidelaj amikoj, kiuj lin vizitis ne povis lin koni; tiel multe estis lia aspekto ŝanĝita.

Interesaj estas ankaŭ la memorskriboj de *Petrucci*, juvelisto kaj domposedanto en Verona; ili estas eldonitaj en la jaro 1825. Li en ili rakontas pri okulvitrofabrikanto, kiu en la jaro 1816 luis la teretaĝon ĉe li, kaj kies simileco je Napoleon estis tiel granda, ke li tuj ricevis la moknomon „Buonaparte“. La okulvitrofabrikanto je mirinda mallonga tempo atingis bonan negocon, kaj li ne sole akiris la konfidon de siaj klientoj sed ankaŭ la simpation de ĉiuj la najbaroj. Li vivadis trankvile kaj sole dum kelkaj jaroj, ĝis li subite adiaŭis la domposedanton kaj transdonis al li unu zorgeme sigelitan rulaĵon kun la jenaj vortoj: „Se vi ne antaŭ tri monatoj ricevos sciigon de mi, mi petas vin sendi tiun

ĉi dokumenton al la reĝo de Francujo“. Post tiu ĉi interparolado la juvelisto nek aŭdis pri, nek vidis sian strangan luinton, kaj je tri monatoj poste li sendis la dokumenton al Francujo, kaj post mallonga tempo franco vizitis la juveliston, kaj proponis al li cent mil frankojn kontante, se li rekompence volus promesi, ke li neniam priparolus la dokumenton kaj ĝian historion. La brava Petrucci kompreneble ĝis sia morto havis la konvinkon, ke li siatempe loĝigis la mondkonkvestanton en sia teretaĝo.

Krom tiuj ĉi multaj memoraroj ekzistas multaj privatletoj kaj oficialaj dokumentoj, kiuj ankaŭ ŝajnas havi valoron por la opinio, ke Napoleon ne mortis en Longwood sur la malgranda rokinsulo en Atlantiko.


En la privata taglibro de prokuratoro *Karl Friedrich Arnstein* el *Schönbrunn* estas trovataj la jenaj interesaj rimarkoj.

„Hieraŭ nokte provis nekonsata viro enpenetri la imperiestroparkon per stupetaro. La gardostaranto mortpafis lin. Antaŭ ol li mortis, li balbutis la jenajn vortojn: „Duko de Reichstadt . . . reĝo . . . filo!“ En la poŝo de la mortinto ne estis trovataj dokumentoj je iu ajn speco, sed li certe estis franco kaj je princa deveno, ĉar la ambasadoraro postulis lian kadavron“.

Do oni opinias, ke ne estas Napoleon sed lia duulo, alias *Robeaud*, kiu la 15-an de Junio 1815 enbordigis la fregaton „*Bellerophon*“, kie li donis sin en la manojn de la angloj. La imperiestro mem forkuris al Verona, kie li establiĝis kiel okulvitrofabrikanto. En la jaro 1823 reaperas lia patra amo al la filo, li trandonas la sekretan dokumenton al Petrucci kaj forvojaĝas por trovi sian filon, sed precize en la sama momento je kiu li preskaŭ atingas sian celon, ĵus tiam kiam li opinias, ke li povus premi sian karan infanon al sia koro, la morto lin atingas.

Diversaj historiaj verkistoj provis enpenetri tiujn ĉi misterojn, sed vane. La postsignoj jam de longe estis elviŝitaj, kaj oni nur mokis iliajn senesperajn provojn. Iom da utilo faris tamen tiuj ĉi esploroj, ĉar laŭ la loĝantarregistroj en Baleicourt oni scias, ke la soldato *Robeaud*, naskita en Baleicourt, Meuse, mortis sur St. Helena, sed la jaro de la morto, kiel ankaŭ la tago kaj la monato estas zorgeme forskrapitaj.

Ĉu do estus eble ke ne estas Napoleon la granda, kiu ripozas sub la ĉarmega kupolo en la Pariza katedralo, meze de la franca popolo, kiun li, la enkarniĝo de Francujo, amis tiel multe? Ĉu jes? . . . Ĉu ne? . . .



Patrolanda Kanto


de
H. C. Andersen

Danlando estas mia hejmo ĉarma,
En ĝia ter' radikon havas mi.
Patrina voĉo! mia lingvo varma,
Al mia koro dolĉe iras vi.
Karega dana land'
Kun tumultuso-ĉeno
Ĉe kampo de lupol' kaj pomĝardeno,
Mi amas vin, mia patruj', Danland'!

Ĉu la somero kreas florojn ie
Pli riĉe ol ĉi-tie ĝis la mar'?
Pli hele brilas la plenlun' nenie
Ol en la hejmo de la fagarbar'!
Karega dana land'
Kun Dannebrog' ondante
Ĝi venis al ni de l'ĉiel' falante,
Mi amas vin, mia patruj', Danland'!

Ho, lando bela, kie mi naskiĝis,
En kies ter' radikon havas mi
Kaj kie la patrina voĉ' kuniĝas
Je l'ĉarma lingv' en dolĉa melodi';
Karega dana land'
Herbfreŝa insularo
Kun nest' de l'cign' sovaĝa ĉe la maro,
Mi amas vin, mia patruj', Danland'!

Trad. J. Wulff.



Postkongresa Ekskurso al Zakopane.

Inter la multaj urboj, urbetoj kaj banlokoj, kiuj invitis al postkongresaj tagoj, ankaŭ estis Zakopane, banloko en la Tatraj montoj, fama pro sia beleco. Eleganta gvidlibro tiel alloge priskribis la ĉarmajn montojn, ke mi decidis tien iri. Ĉirkaŭ 70 esperantistoj i. a. Dro Zamenhof kaj familio kune forlasis Krakovon matene je dimanĉo post la kongresa semajno. En du vagonoj, I kaj II klaso, la esperantistoj ĝuis la belegan veturadon pagante nur por III klasa bileto. Tre malrapide la vagonaro sin movis tra la belegaj pejzaĝoj, pli kaj pli la lando sin levas ĝis subite la grandegaj montoj kuŝas rekte antaŭ niaj okuloj.

Kiam la vagonaro haltas antaŭ la stacidomo, ni tuj vidas, ke la kongreso ankoraŭ ne finiĝis. La loĝantaro atendas nin, festvestitaj ili estas la junaj kamparanoj, iliaj multkoloraj vestaĵoj brilas en la hela sunbrilo, ruĝajn kaj bluajn silkbantojn oni vidas sur la brusto de l'junaj viroj, tiuj estas la naciaj koloroj, sed la urbestro je honoro de l'esperantistoj portas verdan banton. Kamparaj veturiloj alportas nin al niaj hoteloj aŭ pensioj, kaj duonhoron poste ni kolektiĝas en la plej granda restoracio de la vilaĝo por tagmanĝi. La prezidanto de l'Tatramonta Societo deziras bonvenon kaj invitas al ekskurso en la valon de Koscieliska. Sekvas nun la vico de l'paroladoj, unu reprezentanto por ĉiu el la ĉeestantaj nacioj alportas saluton, kaj Sro *Leo Belmont* tradukas polen la paroladojn.

Post la manĝado ĉiuj en aro promenas al la bela valo gvidataj de kvar violon, ludantaj kamparanoj. Refreŝiganta estis ĉi-tiu promonado, la freŝa monta aero forbalais ĉiun kongreslacecon. Ĉiumomente ni haltas, estas la nelacigebla ĉiame fotografanta Sro *Sabadell*, kiu kaptas novan grupon de l'esperantistoj, baldaŭ ĉe roko baldaŭ ĉe akvofalo aŭ rivereto. En la valo de Koscieliska ni renkontas infanojn, kiuj dancas naciajn dancojn por ni, dum ili kantas.

Je nia alveno ni ricevis inviton al vizito en la Hidropatia Instituto de Dro *Chramiec*, kaj dum la vespero ni tien veturis; la sanatorio estis iom ekster la vilaĝo. Granda estis nia surprizo, kiam ni alvenis al la sanatorio kaj vidis la tutan konstruaĵon brili de supre ĝis malsupre: la doktoro estis aranĝinta feston por akcepti Dr. *Zamenhof* kaj la esperantistojn. Li mem kaj lia afabla edzino staris en la antaŭĉambro kaj akceptis la gastojn,

DANLANDO

kaj kondukis ilin en la manĝoĉambregon, kie longaj tabloj atendis nin.

Starante ni ĝuas la bonegan mangaĵon, babilante kun la ne-esperantistaj gastoj uzante la bonan okazon por propagandi nian lingvon. Post la manĝado ni iras al granda koncertsalono, ĉi-tie ni aŭdas paroladon de nia Majstro, kiu dankas pro la afabla akcepto kaj de unu el la kuracistoj ĉe la sanatorio, kiu bonege parolas nian lingvon. Interese li rakontas pri la sanatorio, kiu estas tre vizitata restadejo por homoj, kiuj suferas pro nervaj malsanoj: 300 ĉambroj estas en la sanatorio, ili plej ofte estas okupataj ĉiuj. Ke restado tie estas saniga, oni povas vidi; la malsanuloj, kiuj partoprenas en la festo, ĉiuj aspektas treege sanaj. Ĉi-tie ankaŭ parolas reprezentantoj por la diversaj nacioj, kaj Sro *Belmont* ree estas afabla tradukisto. Fine ni aŭdas belan koncerton, kaj post ĝi komencas balo. Je tiu punkto de la festo multaj el la esperantistoj adiaŭis la afablajn gemastrojn i. a. mi, ĉar ni tute ne pensis pri festo en Zakopane, kaj tial ne kunportis niajn festvestaĵojn, kaj mi povas aldoni, ke la Zakopananoj estis treege elegantaj, oni sentis sin kiel ĉe granda franca aŭ angla banloko. La plej granda parto el la tie loĝantaj gastoj certe estas el Vieno kaj Budapeŝto. Dum la somero Zakopane estas vizitata de ĉ. 15,000 turistoj, kaj dum la senventa vintro, kiu daŭras ĝis 6 monatoj, la vilaĝo estas loko por vintraj sportoj. Zakopane entute estas la centra punkto por ĉiuj ekskursoj en la belaj altaj Tatraj-montoj. La Tatra Turista Societo klopodas pri esplorado de la montoj por faciligi ilian vizitadon, ĝi ankaŭ prizorgas gvidistojn tra la montoj. Zakopane antaŭe apartenis al la reĝaj bienoj, sed nun ĝi estas posedaĵo de grafo *Zamojski*. Se oni deziras resti en Zakopane pli ol 48 horojn, la Registara Komisio postulas depagon de 2 kr. por la unua semajno kaj ankaŭ 2 kr. por la sekvantaj 5 semajnoj; tiuj, kiuj loĝas pli ol 6 semajnojn, pagos 12 kr. En Zakopane troviĝas 4 sanatorioj, 9 hoteloj kaj 11 pensioj; mi loĝis en pensio Podlasie, kies mastrino estas la plej zorgema kaj scivolema persono, kiun mi ĝis nun renkontis; kvankam ni ne komprenis unu la alian, ŝi provis konversacii min en la plej aĉa miksaĵo de germana, franca kaj angla lingvo kaj provis imagigi al mi, ke la granda komuna manĝado okazus en ŝia pensio, por ke mi restu hejme ĉe ŝi.

Frumatene la venontan tagon, 6 el ni, kiuj ne povis resti pli ol 2 tagojn en Zakopane, sole entreprenis ekskurson en la montoj. Bone provizitaj kun diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ni komencis

nian veturadon jam je la 7a matene en malnovaj kamparanaj veturiloj. La celo de nia veturado estis la bela lago „Morskie—Okulo (Mar-Okulo), kiu kuŝas 1393 m. alte. Mirinde belega estas ĉi-tiu ekskurso; la panoramo, kiu etendiĝas antaŭ niaj okuloj estas grandioza. Zigzage ni veturas, malrapide la ĉevaloj marŝas, la veturigistoj ofte lasas al la ĉevaloj la kondukadon de la veturilo kaj iras babilante flanke de la veturilo fumante cigaredojn; la ĉevaloj ankaŭ bone povas trovi la vojon, ili ja iras tie de tago al tago, kaj se ili deziras trinki, ili mem iras al la fontoj aŭ rivereto kiuj preterfluas la vojon. Post tri hora veturado ni haltas por manĝi nian kunportitan manĝaĵon: ni ĝuas ĝin en la herbejo sidante sur renversiĝintaj arbotrunkoj. Je la 2a h. ni estas ĉe la belega lago; en motorboato ni veturas trans la lagon, kies kristalbrilan akvon ni survoje gustumas. La lago cetere estas la sola el la montaj lagoj, en kiu vivas salmoj. Sur la alia flanko de la lago ni suprenrampas la monton ĝis alia lago, kaj de tie ni ĝuas la belan panoramon. Ĉirkaŭ ni leviĝas la gigantaj montoj, sur la alia flanko de la lago jam komencas la eterna neĝo; tie, kie la suno brilas sur la lago, ĝi havas azurbluan koloron, tie, kie la suno forlasis ĝin, ĝi havas tute verdan aspekton. Tra la pura freŝa aero ni de malproksime aŭdas la tinteton de la sonoriloj de l'bovinoj, kiuj paŝtas sur la montoj, ni povas vidi ilin sed nur kiel muŝojn. Malgranda kaj malforta oni sentas sin starante tie; kiom malgrandaj ni estas, kaj kiom grandaj la montoj estas, ni tuj vidas. Du samideanoj, kiujn ni okaze renkontis en la montoj deziras suprenrampi la montojn por tiamaniere atingi Hungarujon, ili forlasis nin tie; „vivu Esperanto“ ni krias, voĉo inter al montoj ripetas du-tri-foje „vivu Esperanto“, estas la eĥo kiu montras sin kiel amiko de nia lingvo! Niaj du samideanoj forlasis nin, per la okuloj ni sekvas ilin, ĝis ni perdas ilin el vido, kaj tiu peco de la vojo nur estas ono de la vojo ĝis la pinto de l'monto, tiom alta ĝi estas.

Ni preskaŭ forgesas la tempon ĉe la bela lago, ni promesis al nia veturigisto reveni je la kvara, tial rapide ni malsuprenrampas. Hejmen ni veturas rapidege, nur tri horojn ni uzas por la veturado; mi miras, ĉu la malnovaj veturiloj povas toleri tian rapidecon, kaj dum mi pensas tiel, nia veturigisto subite elsaltas la veturilon, — la haltigilo disrompiĝis! Mi ankaŭ elsaltas, ĉar veturilfabrikado interesas al mi, mi deziras ĉeesti la riparadon, — kun peco da ferfadeno la veturigisto kunligas la disrompitan haltigilĉenon! Ni daŭrigas nian vojon ĝis nova disrompiĝo kaj nova riparado, kaj je la 7a h. ni ree estas en Zakopane.

DANLANDO

Je la sama vespero mia dana akompanantino, Fino *Mikkelsen* kaj mi estis devigataj forlasi Zakopane, niaj devoj vokis nin hejmen; kune kun du afablaj dresdenaj samideanoj ni forvojaĝis dum la nokto. Matene ni revidis Krakovon, mi deziris aĉeti kelkajn poŝtkartojn en la stacidomo; kio estas do tio! neniujn prospekt-ojn mi vidas, nur fantaziajn poŝtkartojn, — la esperantistoj aĉetis ilin ĉiujn; mi nun memoras, ke dum la tri unuaj tagoj estis vendataj 27,000 poŝtkartojn! En Breslaŭ niaj amikoj forlasas nin, ni sendas bonajn pensojn al niaj samideanoj en ĉi-tiu urbo, kie ni dumvoje al Krakovo pasigis du agrablajn antaŭkongresajn tagojn Ni sentas, ke nun la kongreso finiĝis.

Margrethe Noll.

Kloden rundt

Fundet ved Hjælp af Esperanto. I „Germana Esperantisto“ skriver en tysk Esperantist, *Robert Pfenningwerth*: „En Broder af mig har i 20 Aar opholdt sig i Amerika. For 12 Aar siden modtog vi det sidste Brev fra ham, siden synes han ganske forsvundet. Jeg har gjort alt muligt for at finde ham, jeg har forespurgt gennem Post, Politi, Konsul, alt forgæves. I Maj sidste Aar skrev jeg til Redaktionen af Amerika Esperantisto, som straks bad en Esperantist, der boede i Nærheden af det Sted, hvorfra jeg havde faaet det sids'e Livstegn fra min Broder, om at undersøge Sagen. 3 Maaneder efter fik jeg Svar fra Redaktionen, at Esperantisten havde fundet min Broders Hustru, min Broder var desværre død for 2 Aar siden. Nu var det mig endelig muligt at skrive til min ny Svigerinde, som, fordi hun ikke var det tyske Sprog mægtig, i 2 Aar forgæves havde gjort Forsøg paa at komme i Forbindelse med mig. Dette skylder jeg kun Esperanto“. —

Og saa er der dog Folk, der tvivler om Esperantos Udbredelse og Nytte.

Esperanto i Praksis. Vore Modstandere vil altid gerne fortælle at Sproget endnu ikke er til nogen Nytte i det daglige Liv. Vi Esperantister ved bedre; men en Gang imellem kan det jo være godt at fremhæve nogle Eksempler. Her er et: Det ansete Firma E. Neumann & Ko. i Dresden, der d. 15. Okt. fejrer 25 Aars Ju-

bilæum, er et af de 175 Firmaer, der i denne By bruger Esperanto i Praksis.

Blandt andre Ting handler Firmaet ogsaa med Kotillons og Karnevalsager; i Løbet af 3 Maaneder, Juni—August, altsaa en Tid, der ligger udenfor den egentlige Saison, har Firmaet paa Esperanto modtaget følgende Bestillinger: 64 fra Tyskland, 14 fra Østrig, 2 fra Norge, 1 fra Danmark, 6 fra Frankrig, 2 fra England, 1 fra Italien, 7 fra Rusland, 3 fra Amerika, 3 fra Asien, 3 fra Afrika, ialt 106 Bestillinger, desuden 210 Forespørgsler om Kataloger og andre Sager.

Disse Bestillinger har ofte krævet en omfattende Korrespondance. Firmaet er imidlertid godt rustet i den Henseende, idet 8 af Personalet og en af Cheferne er Esperantister.

Japan Trad Review, der redigeres paa Engelsk og er smukt illustreret, har lovet at optage Esperanto i sine Spalter, saafremt Esperantisterne vil være Redaktionen behjælpelig med Artiklerne. Skriv efter Prøvenummer og abonner paa Bladet. Adr. Japan Trad Review, 4 Jurakucho Itchome. Tokyo—Japan.

Seinedepartementets Raad har fornylig bevilget en Understøttelse paa 300 Fr. til den „Parisiske Esperanto Gruppe“, 50 Fr. til Gruppen i Charenton og 50 Fr. til Gruppen Pré-Saint-Gervais.

I **Grenoble** eksamineredes i Juli de Drengene, der i 1912 havde deltaget i Esperanto Kursus. Inspektøren ved de højere Skoler, *Laronchère*, overværede Eksaminen. 26 Drengene modtog Attest, 41 fik Præmier bestaaende af Bøger skænkede af Borgerraadet.

Istrien. Takket være Prof. *Demetrio Cossaros* Bestræbelser er Borgmestrene i Byerne Capodистра og Muggia vundet for Esperanto og har tilsagt Sagen deres Støtte. Prof. Cossaros har selv ledet et Kursus i Muggia, ved Afslutningen kom Borgmesteren selv tilstede og takkede Professoren i Borgerraadets Navn, og en af Eleverne en Lærerinde, Frk. *Bennuzzi*, overrakte Professoren et smukt Guldur med Kæde som Tak fra Eleverne.

Henri Poincaré, den berømte geniale Videnskabsmand, der i Juli pludselig afgik ved Døden i Paris, var en varm Beundrer af

DANLANDO

Esperanto, bl. a. sad han i det videnskabelige Tidsskrift „Internacia Sciencia Revuo's“ Æreskomite.

Den internationale Kongres for sammenlignende Pathologi, der afholdes i Paris fra den 17.—28. Okt., har tilladt Esperanto som Korrespondance Sprog.

Gent. Komitéen for Udstillingen i 1913 har udsendt et smukt Panorama samt et Kort over Byen med Esperanto Tekst.

I Tilburg (Nederlandene), hvor der ogsaa til næste Aar afholdes international Udstilling, bærer alle Tryksager, der udsendes fra Udstillings-Komitéen Paaskriften „Oni korespondas esperante“.

I Haag blev der i Anledning af Esperantos Jubilæum udsendt 10,000 Flyveblade om Sproget. Esperantisterne besørgede selv Omdelingen over hele Byen.

Kina. Ministeren for offentlig Undervisning i Kunst og Videnskab i Kina, *Tsai Guenbeh*, skriver i et Brev til General *Sebert* ... „Fra nu af vil jeg gøre alt, hvad jeg kan for at udbrede Kendskab til det neutrale Sprog i alle Dele af vor Republik for at lette det internationale Samkvem. For at bevise, at jeg er en af Deres Meningsfæller, kan jeg meddele Dem, at jeg for nylig har oprettet et Esperantokursus i vor Hovedstad.

I en anden By, Shanghai, er der for Tiden fire Kursus, et af dem afholdes ved den kinesiske Føderation, hvis Direktør er Ekspræsident *Sun Yan Sen*. Hvad dette betyder for vor Sag forstaar sikkert alle.

Det Britiske Bibelselskab har besluttet at udgive Bibelen paa Esperanto.

Dresden. Det meddeles officielt fra denne By, at den kongelige saksiske Regering har bevilget det saksiske Esperantoinstitut en aarlig Understøttelse paa 1000 Mark; og har Regeringen desuden i disse Dage udgivet en elegant udstyret paa Esperanto skrevet, og med mange Illustrationer forsynet, Beskrivelse af den kongelige Porcelænsfabrik i Meiszen. Denne Beskrivelse faas hos Esperantoinstitutet (adr. Dresden, Ständerhaus, Çambro 83) mod Indsendelse af 1 international Svarkupon.

Det internationale Korrespondance-Bureau for katolske Blade, som vi omtalte i vort Augustnummer er nu traadte ud i Livet med Hovedsæde i München, Herzog-Rudolfstrasse 5.

Bayern. Et stort og interessant Foretagende er man i Færd med at realisere i dette Land, idet man har besluttet at bygge en By, som skal bære Navnet „Parkurbo Esperanto“.

Den 8de Juni stiftedes en Propaganda Forening med ovennævnte Formaal, og straks slog Planen an, en rig Bankier, Hr. *Schuler* skænkede Foreningen over 1 Mill. Kvadratmeter Jord ved Bredden af den lille Flod Würm, 13 Kilom. fra München.

Ideens Fader er Hr. *Leopold Schlaf*, og en bekendt Arkitekt Hr. *Sievers* har allerede udarbejdet en Plan for den fremtidige By. Foreningen har en Kapital af 2 Mill. Mark til de nødvendige Forarbejder. Ifølge Planen er der nu 500 Byggepladser, men hvis det er nødvendigt kan mere Jord let erholdes. 14 Grunde er allerede solgt til „samideanoj“ af forskellig Nationalitet.

Mange Privatfolk interesserer sig for Opførelsen af Kirke, Skole, Teater, Badeanstalt o. s. v.

Omkring hvert Hus bliver der plantet Træer for at forebygge Brandfare og for at skaffe Byen frisk Luft og Kølighed i varme Somre.

Hr. *Schuler* har forpligtet sig til kun at overlade Grunde og Huse til Esperantister eller til Familier, som blandt sine Medlemmer tæller mindst en Esperantist.

Iblandt Propaganda-Ligaens Medlemmer findes mange med fremragende Navne og man beder Esperantister i alle Lande om at indmelde sig, man gør det dristigt, der betales intet Kontingent, det er ikke Penge, men den moralske Støtte man appellerer til for at Tanken snarest muligt kan blive til Virkelighed.

Ønsker man nærmere Oplysninger, henvende man sig til „Propaganda Ligo, Parkurbo Esperanto“, München, Pfandhausstr. 8.

Bergen. Den derværende Handelsskole har indført Esperanto som valgfrit Fag; i Øjeblikket underviser Hr. Adjunkt *Schibbye* 15 Elever. Det gaar fremad i gamle Norge!

Literatura Parto

Nigra Jimmy

Rakonto el Ameriko de V. Cavling.

Mortig-afero okupigis la juĝistaron en New York. La kulpigulo, longa maldika negro kun ŝima kapo, staris antaŭ la barilo por ricevi sian juĝon. Ĉiuj ĉeestantoj konis el la gazetoj la malbelaĉajn detalojn de la mortigo. Pro tio oni aŭdis sopiron de ĝojo kaj kontenteco tra la salono, kiam la ĵurintoj post kvaronhora interkonsiliĝo unuvoĉe deklaris, ke la negro estas „kulpa pro hommortigo unuagrade“.

La pergamensimila vizaĝo de la juĝisto serioze ekzamenis la dokumentojn. Li ankoraŭ unufoje trafoliis la paperojn, remetis sian nazpenĉilon, leviĝis kaj anoncis: „*James Arthur Sullivan el Virginio*, laŭ la propono de la juĝistaro, estas kondamnita suferi la morton!

Malvarma blovo penetris la aŭskultantojn. Sento de teruro, de mort-tremo dum unu sekundo paralizis ĉiujn. La negro fermis la okulojn, kaj la pensoj kuris tra lia kapo.

Estis kvazaŭ li nun subite je unua fojo vidas la tutan aferon tiel, kiel ĝi okazis.

Ĉio estis treege malgaja. Liaj genuoj senfortiĝis, kaj li estis devigata palpeti per la manoj por trovi apogilon. Li sentis sin neesprimeble sola, li — la nigra krimulo inter ĉi-tiuj blankuloj. Li rimarkis, ke la juĝo ĝojegis ilin, li sentis, ke tio faras al ili ĝojon, ke li estos mortigata. Kiel tio povus esti alimaniere. Li estas mortigisto, kaj oni ja ekzekutas mortigistojn. La viro ĉi-supre sur la juĝ-seĝo, kun la akra vizaĝo kaj ĉiuj la malgrandaj sulketoj ĉirkaŭ la okuloj, estas prava. Kvankam li aspektas malvarma kaj kvieta, li certe interne estas tre kontenta mortkondamnante lin. Kial ne? Li ekrememoris la vivon, kiu baldaŭ estos finita. Ĉio okazis tute nature.

Liaj gepatroj estis sklavoj ĉe riĉa plantist-familio en Suda Virginio Post la milito, ili estis liberigitaj, sed restis en sia malnova servo.

Sur ĉi-tiu bieno li naskiĝis, kaj tie li grandiĝis, li — la malgranda negro Jimmy kune kun *Jacob Field*, la samaĝa filo de

la plantisto. Ili vivis kiel fratoj, ludis kune sur la kotonkampoj kaj en la arbaroj. Por ili ne ekzistis diferenco inter nigra kaj blanka, ili estis egale bonaj kaj sentis grandan reciprokan amon. Sed la feliĉa infan tempo forflugis, Jimmy havis 14 jarojn, kaj la bienposedanto ne plu povis konservi lin; li devis vojaĝi al *New York* por ekzisti laŭ plej bona povo. Jacob kaj Jimmy adiaŭis unu la alian je la lasta fojo, ambaŭ ploris, kiam la vagonaro forveturis.

Tre severa tempo atendis Jimmy en *New York*. De post sia naskiĝo li kuteme interrilatis kun la blankuloj kiel egalulo, neniam li sentis la pikilon de l'malamo kontraŭ la raso. Nun li subite staris en tiu-ĉi granda blanka urbo, kie oni profunde malestimis homojn de lia koloro. Ĉie malvarmaj, malkompatemaj mienoj renkontis lin. La blankuloj, kiuj promenis en la strato, apenaŭ vidis lin — li povus esti kvazaŭ aero. Al negro oni nur havis fortan malvarmegon. Longtempe li ĉirkaŭmigris ne povante trovi labaron, li ja estis malgracia kampar-negro, kiu ĉie malsukcesis. Li vivis je okaza rabado, kaj tiamaniere li malfaliĉe trenis sin tra 5 longaj jaroj. Dume Jacob Field ankaŭ estis veninta al *New York* pro siaj studadoj, sed ĉe Jimmy, kiu nun elsciis la diferencon inter tago kaj nokto, ne aperis la penso serĉi lin.

La negro suferis kaj malsatecon kaj mizeron, kiam li fine akiris okupon, cetere aĉan aferon. Li atingis servon kiel „celtabulo“ en ovbutiko sur *Coney Island*. Tiuj-ĉi ovbutikoj estas aranĝitaj kiel ordinaraj pafejoj, nur oni ne pafas, sed ĵetas putrintajn ovojn al la celo, kiu estas la kapo de negro. Kvankam nigrulo estas bone pagita por sidi en tiu ĉi pilorio, tamen tio estas rigardata kiel la plej malalta grado, ĝis kiu viro povas malsupreniri. Sed Jimmy havis nenian elekton. Li estis devigata toleri la putrintajn ovojn.

Tiam okazis unu tagon, ke li amalnova amiko Jacob Field kune kun kelkaj junaj studentoj estis enirintaj la pafejon. Jimmy tuj rekonis sian antaŭan kamaradon, sed tiu-ĉi kompreneble ne konis lin. La studentoj estis fieraj junaj viroj, kiuj prenis profunden en la amaso kaj ĵetis unu putrintan ovon post la alia al lia kapo. Jacob Field estis la plej fervora. Li laboris sisteme. Ovo post ovo flugis el lia mano kaj disrompiĝis sur la frunto de l'negro. La junaj homoj ridis kaj ĝojkriis pro sia lerteco.

Sed nun la afero fariĝis netolerebla por la nigrulo. Larmoj ekfluis el liaj okuloj, kaj li kriis per raŭka kaj ĝemanta voĉo: „Sro Field, ne ĵetu pli multe da ovo, mi estas Jimmy“. Sekvis

DANLANDO

silento dum unu momento. Tiam la studentoj ekkomencis ridi. Kion do imagas ĉi-tiu nigra bubo; eble li estas amiko de Field?

Sed Jacob fariĝis silenta aŭdante la voĉon de Jimmy; tiam li subite ekridegis. „Nu, li estas Jemmy, bone, bone! Do estas pli bone, ke li ricevas aldonan pafon. Li ŝovis la ĉemizmanikon ĝis super la kubuto, elserĉis zorgeme grandan malbonodorantan ovon kaj sendis ĝin per mano senskuiĝanta rekten en la vizaĝon de l'negro. La ovo frape disrompiĝis, kaj la abomena flavaĵo superfluis la nigran vizaĝon. La studentoj ĝoje ĉirkaŭsaltis.

Tiam estis, ke Jimmy freneziĝis. La malamo ekflamiĝis en li — ĉiu la malico, kiun li estis kolektinta dum tiuj-ĉi multaj jaroj, eksplodis. Li kuregis al Field kaj batis lian kapon per pugnoj, ĝis la infankamarado morte kuŝis ĉe liaj piedoj. Tiam li fine kvietiĝis. Li sidiĝis flanken de la korpo kaj forplovigis la restaĵon de sia malico. Li denove estis bona kaj submetiĝa, kiam la policanoj kunprenis lin. Tiamaniare la afero okazis? — — —

„Forportu la arestiton“, sonis la voĉo de la juĝanto tra la nebulo de la juĝeja ĉambrego. Du policanoj prenis lin je la manradikoj kaj puŝis lin tra la ĉambrego, preterpasis la skribantajn ĵurnalistojn, la belajn sinjorinojn, la tutan scivolan amason. Li vidis triumfon en ĉiuj rigardoj. Feliĉe ekzistas ankoraŭ leĝo kaj justeco en la lando!

Trad. Asta Mikkelsen.

Azteka Kalendaro.

Tiu ĉi granda ŝtona kalendaro estis retrovita en la *Plaza mayor* de la ĉefurbo meksika la 17an de decembro 1790, kiam laboristoj estis forprenantaj iom da tero. Nur 18 koloroj da tero kovris ĝin. Verŝajne la aztekoj kaŝis ĝin tie antaŭ la alveno de la hispanoj.

Laŭ kalkuladoj ĝia pezo estas 482 centfuntoj! Nekomprenoble ŝajnas kiamaniere la grandega ŝtono povis esti alportita de la altaj montoj malantaŭ lago *Chalco* ĝis Meksiko (tiam nomita *Tenochtitlan*), ĉar en tiu tempo ne ekzistis ŝarĝbestoj ĉi tie.

La tuta ŝtono estas perfekte skulptita. La supraĵo estas dividita en ses partoj. En la centro vidiĝas bildo de la suno kune kun ĝiaj insignoj kaj ornamoj. La kvar kvadratoj super kaj sub la suno reprezentas la kvar epokojn de la mondo kaj la kvar ĉefajn festojn. Flanke de la suno estas du signoj similaj al hufferaĵoj, kiuj reprezentas *Cipactonal* (Cípaktonal) kaj *Oxomaco* (Oŝomako),

lian edzinon, kiujn la aztekoj kredis la elpensintoj de la astronomio.

La dua zono montras la dudek tagojn, kiuj formis la aztekan monaton. La tria zono havas kvar figurojn iom similajn al reversita V., kiuj simbolis radiojn de la suno. Inter ili troviĝas dek rektanguloj malgrandaj, ankaŭ dek du kiujn kvazaŭ kovras la kvar figuroj, — entute kvindek du, la nombro da jaroj en la azteka jarciklo. En ĉiu rektangulo troviĝas cirklo kaj kvar malgrandaj ovaloj figuraĵoj de la tagoj, kiuj formis la semajnon kaj la sumon da 260 tagoj, kiuj formis la lunjaron. La sunjaro estis egala al la nia, konsistante el 365 tagoj.

En la kvara zono ankaŭ troviĝas kvar sunradioj, kies malsupra parto estas nevidebla. La malgrandaj arkoj reprezentas la stelojn ĉirkaŭantajn la sunon. La kvina zono montras al ni *Citlalinyeue* (Citlalinikue), la laktvojon. Malsupre staras duvizaĝa figuro, kiu reprezentas la noktodion *Xoalteuctli* (Soalteuktli). La azteka kalendara ŝtono estas fama monumento de antikva tempo, ĉar ĝi enhavas preskaŭ ĉiujn aferojn de la astronomio.

(el „Amerika Esperantisto“.)

Nia Lando

Esperanto Unuiĝo de Danaj Instruistoj. Okazos je la 23. Novembro ĝeneralkunveno en „Grundtvigs Hus“, Studiestræde 38. Post la ĝeneralkunveno okazos komuna manĝado pro la datreveno de la fondiĝo de l'unuiĝo. La estraro atendas kaj esperas, ke la membroj partoprenu tiom multenombraj kiom eble. Pli detale en la venonta numero. Bonvolu anonci partoprenon al la sekretario.

Kolding. Instruisto en tiu-ĉi urbo Sro *P. Zoffmann* vojaĝis dum 3 semajnoj — per ŝtata stipendio — en Bohemujo kaj Moravio por studi lernejaferojn. Li vojaĝis per Esperanto; kaj kiel membro de U. E. A. li ĉie trovis gesamideanojn, kiuj lin bonege helpis.

Novaj kursoj komencis en Kopenhago. Instruas: Sro *F. Baruël* en „Komerca Lernejo de Nehm“, Sro *G. Hinricksen* en Konversacia Esperantista Klubo, progresintajn membrojn de la klubo, Fino *Asta Mikkelsen*, membrojn de „Esp. Unuiĝo de Danaj Instruistoj“, unu

DANLANDO

kurso por komencantoj kaj unu por progresintoj kaj *Fino Margrethe Noll*, membrojn de „Kristana Celado“.

Horsens. Nia nelacigebla samideano Kapitano *Aae* ĵus komencis kurson en la seminario de *Gjedvad*, 8 Km. de *Horsens*. Tre amuza estas, ke ĉi-tiu kurso estas la rezultato de idista agado. Antaŭ kelka tempo la idistoj elsendis malgrandan broŝuron titolitan „De Esperanto al Ido“, ekzemplero ankaŭ venis al *Gjedved* seminario, sed bedaŭrinde por la idistoj ĝi ne havis la atenditan efikon, anstataŭ studi Idon ili petis Kapitanon *Aae* instrui ilin pri Esperanto, 15 partoprenas en la kurso, kaj multaj el ili jam fervore propagandas nian lingvon.

En Kopenhago okazis la 21 de Septembro la edziĝo de nia samideanino *Fino Poula Grave* kaj *Sro Parrish* el Kalifornio. „Konversacia Esperantista Klubo“ aranĝis en sia klubejo belan adiaŭan feston por ili la 23., kaj la 26. ili forlasis Kopenhagon per ŝipo rekte al Ameriko, sekvataj de multaj bonaj deziroj por la estonteco.

La redakcio de „Danlando“ sendas saluton al la junaj geedzoj en ilia nova hejmo kaj deziras al ili la feliĉon la plej eblan.

Ni kuraĝas aldoni al *Sino Parrish* kiel specialan saluton, ke la redakcio de „Danlando“ ĉiam estos ĝoja pro novaĵoj de ŝia hejmlando.

Societo de Danaj Esperantistoj komencis sian sezonon je ĵaŭdo la 26. Sept. per parolado (en dana lingvo) de *Fino Margrethe Noll* pri la oka internacia kongreso esperantista, kiu dum Aŭgusto okazis en Krakovo. *Fino Noll*, kiu partoprenis en la kongreso kiel unu el la danaj rajtigitaj delegitoj, rakontis vigle pri la pasado de tiu interesa kongreso kaj laŭtleĝis la bonegan paroladon, kiun faris *Dro Zamenhoff* ĉe la malfermo de la kongreso; *Fino Noll* ĝin en dana lingvo estis tradukinta. Varma aplaŭdo de la bedaŭrinde ne tro multenombra aŭskultantaro sekvis la interesan paroladon de *Fino Noll*.

Odense. De tiu ĉi urbo ni ricevis sciigon pri la morto de nia samideano *Sro Rybner-Petersen*. La enterigo, al kiu la tiea Esp. klubo sendis florojn kun esp.-signitaj bandoj, okazis mardon la 22. Al lia familio ni sendas kondolencsaluton plej sinceran.

Hotel-Adresaro.

Odense, Hotel Ansgar.

Biskvitoj kaj **Mielkukoj**

Bona biskvito, mastraja biskvito, sekala biskvito kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de
F. Holle,
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas **senpage** (se la provizo sufiĉas) paketon kun unu el la tri artikoloj.

Ilustrita **Gvidlibro** **pri Vejle**

havebla ĉe

Eldonejo Esperantista
Strandgade 11,
Kopenhago.

==== *Prezo: 35 Øre* ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

Bastonoj kaj Ombreloj
- - - je ĉiuj prezoj - - -

Telefon 8610.

Telefon 8610.

Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

Bredgade 35, København.
(Kopenhago)

Bela poŝa ŝtampilo (la emblem-
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

Ŝtampilo: (la verda stelo). Nur:
35 Øre (25 sd.).

Kuseno: 35 Øre (25 sd.).

:: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,
poŝtkartoj, silkflagetoj, propagand-
iloj, k. t. p.



AMATOROJ!

Aĉetu viajn
fotografajn bezonaĵojn ĉe


MIMOSA

Kopenhago,
Niels Hemmingsensgade 2.



Redakcio kaj Administracio: Strandgade 11, Kopenhago.
[Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.

C. M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-
aĵo de konataj
danaj artistoj en
plejgranda elekto.

Ŝirmfornoj

tre elegante
nikelumitaj.

Kuirfornoj, kaj iz-
ole starantaj kaj

por enmurigo kiel ankaŭ
por hoteloj. Ĉiu speco de
fandaĵkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej
bona fabrikaĵo.**

Alt

Bogtryk

hurtigst
billigst

Harald Jensens
Bogtrykkeri

Admiralgade 24
Tif. 5199